371
.2

H. J. BULTHUIS, L.K.

Malriĉa en spirito

Originala teatraĵo en du aktoj kaj unu interakto

Reviziita de Zanoni

...

T. & H. Jung, Horrem b. Köln, Germanlando
1923

La verko apartenas al: ESPERANTO-INSTITUTO

Signo: Blanka 311/12

aŭtoro Bulthuis, H.J., L.K. | speco

titolo Malriĉa en spirito

eldonejo, loko, jaro: Köln 1923 | dk-n-ro

Ekz. krome en: | formato | vol.n-ro | p. | ilustr. | tab. | mapoj | bind. | indekso | nom. reg.

Dupl bibl (1) | lingvoj | rek. de: | akir. 1.6.48 | prezo

enhavo

antaŭkondiĉoj | historia klasifiko | eldoniĝas

fidindeco | specialigo | lingva kvalito

proprulo kun adreso

graveco | truo | donacita de

enŝlosite? | akirenda pro

pliaj kajeroj? | pruntepreniita ĝis:

Malriĉa en spirito.

Teatraĵo
en du aktoj kaj unu Interakto.

Originale verkita en Esperanto
de H. J. Bulthuis, L.K.
Reviziita de Zanoni.

ESPERANTO-INSTITUTO
MÜNCHEN
ESPERANTO-INSTITUT

KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Łukasza Górnickiego
Nr 2638
FILIA Nr 14
w Białymstoku
82-2
82.1,922-2=912

UNUA AKTO.

Aktoroj.

La Patrino, 50-jara
Johano, ŝia filo, 20-jara, simplulo } du-
Alberto, ŝia filo, 20-jara, soldato } naskitoj.

Scenejo.

Malnovmoda ĉambro. Malfermita fajroloko kun fajro, super kiu kamenkapuĉo. Ambaŭflanke de la kamenkapuĉo po unu fenestro kun fermitaj kurtenoj. Antaŭ ĉiu fenestro po unu seĝo. Unu tablo, dekstre en la meza scenejo. Ŝpinilo kaj seĝo maldekstre de la tablo. Unu ŝranko ĉe la muro dekstre en la antaŭscenejo. Super la ŝranko du bretoj, unu super la alia, kun manĝaĵoj kaj kruĉoj kun akvo kaj lakto. Maldekstre ĉe la muro en la antaŭscenejo benko kun altaj dors- kaj brakapogiloj. Po unu pordo dekstre (apud la ŝranko) kaj maldekstre (apud la benko). Sur la muroj kelkaj bildoj en kadroj kaj spegulo kaj horloĝo. Lampo malhele lumigas la ĉambron. Estas malfrue en la vespero.

Tempo 1812.

Unua sceno.

Patrino. Johano.

La Patrino ŝpinas, sidante apud la tablo. Johano sidas sur la benko kaj plektas korbon; li laboras tre mallerte kaj de tempo al tempo interrompas la laboron, dum li fikse rigardas antaŭ sin, kvazaŭ droninte en pensoj. Li parolas malrapide kaj kelkfoje levas la dekstran montrofingron por klarigi per tio siajn dirojn. Li aspektas kiel simplulo kaj havas arĝente-blankajn harojn.

Johano *(post kiam li laboris kelkan tempon).* Patrino!

Patrino *(parolante kvazaŭ al infano).* Kio estas, Johano?

Johano *(rigardante momenton antaŭ sin kaj interrompante sian laboron).* Ĉu la mondo estas maljuna — — kaj ronda?

Patrino. Jes — tre maljuna — kaj ronda.

Johano *(post momento).* Kiel do maljuna?

Patrino. Miloj da jaroj.

Johano *(post momento).* Kaj ĝi turniĝas?

Patrino. Jes, seninterrompe ĝi turniĝas.

Johano *(faras per la fingro horizontale rondmovadon).* Tiamaniere? — aŭ — *(faras saman movadon vertikale)* tiamaniere?

Patrino. Jes, tiamaniere.

Johano *(post momento)*. Kial ĝi faras tion?

Patrino. Mi ne scias — —

Johano. Kaj ni ne defalas de ĝi?

Patrino. Kompreneble, ni ne defalas.

Johano *(pripensinte)*. Oni falas tamen de fumturoj, ĉu ne?

Patrino. Jes, mia knabo, oni povas fali de fumturo.

Johano *(post momento)*. Patrino!?

Patrino. Kio estas, knabo?

Johano. Kie estas nun Alberto?

Patrino. Li estas en la urbo.

Johano. En la kazerno, ĉu ne?

Patrino. Jes, en la kazerno.

Johano (*post momento*). Sed kial li estas tie?

Patrino. Li estas en la kazerno tial ĉar li estas soldato.

Johano. Ho, soldato, ĉu ne? — Sed kial do li estas soldato?

Patrino. Tion vi demandis jam centfoje. Vi ne memoras plu?

Johano. Cu mi demandis tion jam — centfoje?

Patrino. Jes, mia knabo. Sed tio ne estas grava.

Johano *(post momento)*. Kial do mi demandis ĝin — centfoje?

Patrino. Ĉar vi ĉiam forgesas pri tio, kion oni diras al vi.

Johano. Jes, jes; mi ĉiam forgesas.

Paŭzeto, fulmas kaj tondras.

Johano. Mi ne forgesis pri tio, kion hieraŭ diris la maljuna Heleno.

Patrino. Kion ŝi diris?

Johano. Hieraŭ — kiam mi faris komision, — ŝi staris sur la strato — kun Berto —

Patrino. Kaj kion ŝi diris?

Johano. Ho, mi memoras. — Ŝi diris al Berto — ke mi havas blankajn harojn —, kaj ke mi estas — idioto —

Patrino. Tion ŝi *ne* devas diri! Vi ne estas idioto, vi estas, kiel estas skribite en la biblio — vi estas malriĉa en spirito.

Johano. Ho! — malriĉa en spirito!?

Fulmas kaj tondras.

Patrino (*kovrante siajn okulojn per ambaŭ manoj*). Dio, kia batego!

Johano. Patrino!?

Patrino. Kio estas, knabo?

Johano (*pripensinte*). Ĉu tio estis la mano de Dio?

Patrino. Tio estis fulmo kaj tondro.

Johano (*pripensinte*). Oni tamen diras, ke tio estas la mano de Dio, kiu — kiu frapas la blasfemantojn —

Patrino. Vi ja ne timas tiun manon, Johano, vi neniam blasfemas.

Johano *(pripensinte)*. Mi neniam blasfemas— — *(Post momento)* Ĉu mi estas malriĉa en spirito?

Patrino. Jes. Sed ne malĝoju pro tio, mia knabo, ĉar estas skribite en la biblio: Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.

Johano *(pripensinte, rigardante fikse antaŭ sin)*. Tiom da vortoj kune mi ne bone komprenas.

Patrino. Mi scias, ke vi ne bone komprenas tion. Sed tiel estas skribite en la biblio.

Johano (*post momento*). Patrino!?

Patrino. Kio estas?

Johano. Legu foje tion!

Patrino. Kion?

Johano. Pri la malriĉaj en spirito.

Patrino. Tio estas skribita en la prediko sur la monto. Tio estas multe tro longa por vi, Johano. Vi ja ne komprenas ĝin. Jam laboru kaj ne pensu pri tiaj aferoj!

Johano (*post momento*). Ĝi tamen estas trovebla en tiu via biblio, ĉu ne?

Patrino. Nu do, mi kontentigos vin. Aŭskultu! (*Ŝi prenas la biblion kuŝantan sur la ŝranko kaj legas tre malrapide, dum Johano aŭskultas kun streĉita atento kaj interfingrigitaj manoj.*)

„Kaj vidinte la homamasojn, li supreniris la monton, kaj kiam li sidiĝis, liaj disciploj venis al li.

Kaj malferminte la buŝon, li instruis ilin dirante

Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.

Feliĉaj estas la plorantoj, ĉar ili estos konsolataj.

Feliĉaj estas tiuj, kiuj malsatas kaj soifas justecon, ĉar ili satiĝos.

Feliĉaj estas la kompatemaj, ĉar ili ricevos kompaton."

(*Ŝi formetas la biblion kaj ekŝpinas.*)

Johano (*surprizite*). Kial vi jam ekhaltas, patrino?

Patrino. Mi ja devas ŝpini por perlabori monon.

Johano. Ĉu estas agrable — ŝpinadi?

Patrino. Pri tio mi neniam pensis; mi ja devas, por ke ni povu manĝi.

Johano. Kaj tial *mi* devas plekti korbojn, ĉu ne?

Patrino. Jes, mia knabo.

Johano (*post momento, laborante kontraŭvole*). Ĝi tamen ne estas amuza?

Patrino. Kio ne estas amuza?

Johano. Ĉiam plekti korbojn ne estas amuza.

Patrino. Ne pensu pri tio, Johano; ni ja devas labori.

Johano (*post momento*). Patrino!?

Patrino. Kio estas?

Johano. Legu ankoraŭ!

Patrino. Mi ja preskaŭ ne havas tempon por legi, kara knabo. Mi devas ŝpini — nur ŝpini — —

Johano. Legu ankoraŭ tre malmulte —, mi tre ŝatas aŭskulti ĝin.

Patrino (*ĝemante*). Nu do, ankoraŭ kelkajn versojn. (*Ŝi legas plue.*)

„Feliĉaj estas la kore puraj, ĉar ili vidos Dion.
Feliĉaj estas la pacigemaj, ĉar ili estos nomataj filoj de Dio.
Feliĉaj estas tiuj, kiuj estas persekutataj pro justeco, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.
Feliĉaj estas vi, kiam oni vin mallaŭdos kaj persekutos kaj senrajte vin kalumnios pro mi."

(*Ŝi fermas la biblion kaj remetas ĝin sur la ŝrankon.*)

Johano (*post momento de pripensado, ĉiam rigardante antaŭ sin kaj levante la fingron*). Patrino, eble estas feliĉo, ke mi estas — malriĉa en spirito.

Patrino. Jes, mia knabo.

Johano. — — ĉar mia estos la regno de la ĉielo.

Patrino. Jes. Sed ne pensu tro multe pri tio! Jam laboru, tio distros vin!

Johano (*laboras malrapide*). Mi tamen memoros tion. (*Post momento.*) Patrino!

Patrino. Kion vi havas nun por demandi?

Johano. Papereton!

Patrino. Papereton!? Kion do vi volas fari per papereto?

Johano. Meti en la biblion.

Patrino. Kial?

Johano. Por ke mi mem ĉiam povu serĉi la lokon.

Patrino (*rigardas lin demande*). La lokon?

Johano. La lokon, kie tio estas skribita.

Patrino. Ho, mi komprenas. Nu, mi enmetos papereton. (*Ŝi serĉas, sed tian ne trovas*). Papereton mi ne havas, mi enmetos lanan fadenon.

Fulmas kaj tondras.

Patrino. Ĉielo, kia vetero! (*Ŝi metas la fadenon en la biblion ĉe capitro V-a de Sankta Mateo; poste ŝi denove ekŝpinas.*

Johano. (*rigardante kun atento*). Nun mi mem povos trovi kaj legi tion. (*Post momento.*) Patrino!

Patrino. Kio estas?

Johano. Ŝi ne diris, *kial* miaj 'haroj estas blankaj.

Patrino. Eble ŝi ne scias.

Johano (*levante la fingron*). Mi scias. Tio estas pro teruro, ĉu ne?

Patrino. Jes, Johano, pro teruro. Sed ne pensu tro multe pri tio! Jam laboru!

Johano (*post momento*). Mi ne forgesis pri tio, sed mi ne memoras *ĉion.* Alberto havas *nigrajn* harojn, kaj mi havas *blankajn.*

Patrino. Jes, kaj tio estas la sola diferenco inter vi; escepte de viaj haroj vi similus vian fraton kiel unu guto da akvo similas alian.

Johano. Patrino!?

Patrino (*ŝpinas kaj ne respondas*).

Johano. Patrino — rakontu fojon, kiel *ĉio* fariĝis.

Patrino. Jam tiel ofte mi rakontis tion.

Johano. Jam tiel ofte?

Patrino. Jes, mia knabo; sed vi ne povas memori tiom da vortoj. Vi dronas en ili.

Johano. Rakontu tamen!

Patrino. Nu, mi rakontos ankoraŭ unu fojon, sed tre resume. Aŭskultu bone kaj klopodu memori ĝin!

Johano (*interfingrigas la manojn kaj aŭskultas kun streĉita atento, fikse rigardante antaŭ sin*).

Patrino. Tie — en la urbo, apud la kazerno — —

Johano. Kie Alberto estas?

Patrino. Jes, — tie staras bierfarejo — tre granda bierfarejo — kun tre, tre alta fumturo — —

Johano. Jes, alta ŝtona fumturo —

Patrino. Tiu fumturo estis trafita de la fulmo kaj estis riparota. Ĝi estis fendita de supre malsupren, ĝis la tero. Vi kaj via frato estis riparontaj ĝin. Vi estis tiam masonistoj de fumturoj —

Johano. Jes, masonisto, mi memoras.

Patrino. Vi laboris tute supre sur tiu fumturo.

Johano. Tute supre — en la nuboj — kaj malsupre estis la malmola strato.

Patrino. Subite vi falis, sed feliĉe povis ĝustatempe ekkapti dikan ŝnuron pendantan de supre ĝis dudeko da metroj super la strato. Vi glitis malsupren, sed premis la ŝnuron tiel forte,

per ambaŭ manoj, ke vi restis pendanta. Kaj vi svingiĝis tien kaj reen inter la ĉielo kaj la tero —

Johano. Mi memoras — mi svingiĝis —

Patrino. Via frato, kiu sidis supre sur la fumturo, laŭte kriadis pri helpo, sed kiu povus helpi? Vi ne estis sufiĉe forta por pendi tie longan tempon. Krom tio, viaj manoj estis senhaŭtigitaj pro la rapida glitado kaj brulvunditaj, kaj daŭrus multe tro longe, se helpantoj suprenirus kun ŝnuroj, per kiuj via frato povus atingi vin, por firme ligi alian ŝnuron ĉirkaŭ via talio kaj malsuprenigi vin teren. — Ni ne sciis, kion fari — — Ĉiuj homoj kuris tien kaj returne, laŭte kriante — — Mi staris malespere tie kaj timis ĉiusekunde, ke vi falos — — Subite min kaptis ideo. Mi kuris en apudan domon kaj petis pri du grandaj lanaj litotukoj. Kvar fortaj viroj, ĉiu ĉe unu pinto, etendis ilin, unu sur la alia, kaj ekstaris ĉe la bazo de l' fumturo, sur la loko, kien vi nepre falos. Tie ili atendis rigardante supren al vi —, kaj preskaŭ tuj poste viaj fortoj estis elĉerpitaj — kaj kun laŭta, longa ekkrio, kiu penetris mian animon, vi falis kapon antaŭe en la mezon de la duobla litkovrilo — —

Fulmas kaj tondras.

Patrino. Dio, kia ekbato!! (*Ŝi kovras siajn okulojn per ambaŭ manoj.*)

Johano (*aŭskultas ankoraŭ kun strečita atento; post momento*). Kaj poste?

Patrino. Kvankam la etendita litkovrilo haltetigis la falon, la viroj tamen ne estis sufiĉe fortaj por eviti, ke la kovrilo tuŝegis la teron — kaj via kapo trafis la ŝtonojn de la strato — —

Johano (*kaptante la verton de sia kapo*). Jes, mia kapo trafis la ŝtonojn.

Patrino. Vi kuŝis senmove, kaj ĉiu timis, ke la falego mortigis vin. Sed vi vivis ankoraŭ. La viroj portis vin hejmen. La doktoro venis kaj konstatis cerbo-ekskuon. — Longe vi kuŝis morte-malsana, sed fine vi resaniĝis. — Post tiu tempo vi ne povis plu labori kiel masonisto.

Johano. Nun mi memoras — precipe la ŝtonojn —

Patrino. Kaj nun vi plektas korbojn.

Johano. Kaj miaj haroj subite blankiĝis, ĉu ne?

Patrino. Jes, pro teruro, dum vi pendis tie.

Johano. Pro teruro. Mi memoras. Kaj la maljuna Heleno diris, ke mi estas idioto —

Patrino. Vi tute ne estas tia; vi estas, kiel mi jam diris: malriĉa en spirito.

Johano. Tio estas skribita tie en la biblio, ĉu ne?

Patrino. Jes, tamen ne pensu tro multe pri tio! Jam laboru, tio distros vin!

Johano (*laboras; post momento*). Patrino!?

Patrino. Kio estas?

Johano. Kial Alberto estas soldato?

Patrino. Mi jam ofte diris, ke mi ne povas klarigi tion al vi. Eble, ĉar la imperiestro intencas ataki Rusujon per granda armeo.

Johano. Kial la imperiestro volas ataki Rusujon?

Patrino. Eble por batali kontraŭ la rusa imperiestro.

Johano. Alberto tamen revenos, ĉu ne?

Patrino. Dio ĝin volu! (*Ŝi ĝemegas, ĉesante ŝpini kaj rigardante antaŭ sin, kaj fine forviŝas larmojn.*)

Johano. Kial vi ploras, patrino?

Patrino. Mi ne povas klarigi tion al vi, mia infano, vi ja ne komprenas ĝin. (*Rekomencas ŝpini.*)

Johano (*post momento*). Patrino?

Patrino. Kio estas?

Johano. Kial vi ŝpinas la tutan tagon?

Patrino. Tion mi ja klarigis al vi: por ke mi povu aĉeti panon por vi kaj por mi.

Johano. Kial do Alberto ne laboras por ni?

Patrino. Li ja estas soldato, lin bezonas la imperiestro.

Johano. Vi ankaŭ lin bezonas tamen.

Patrino (*ĝemas sed ne respondas*).

Johano (*post momento*). Patrino, ĉu ni devas labori en la ĉielo?

Patrino. Tie ni ĝuos ripozon, mia knabo.

Johano. Ĉu ankaŭ tio estas skribita en la biblio?

Patrino. Jes.

Johano. Kaj ke mi vidos Dion?

Patrino. Jes, mia knabo. Vi vidos Lin!

Johano. Kiam?

Patrino. Kiam vi estos mortinta. Sed ne pensu pri tio, jam laboru!

Fulmas kaj tondras.

Johano (*post momento*). Ankaŭ, se la fulmo trafus min?

Patrino. Jes, sed la bona Dio malhelpu tion!

Johano. Ankaŭ, se mi falegus de la fumturo — sur la ŝtonojn? Sed ili estas tro malmolaj. (*Post momento de pripensado.*) Ankaŭ, se mi saltus en la riveron?

Patrino. Kara ĉielo! Johano, ne diru tian sensencaĵon. Vi ja scias, ke tio estus mem-mortigo. Mem-mortigo estas mortpeko. Dio malpermesas sin-mortigon.

Johano (*post momento*). Mem-mortigo? Jes, tio estus mem-mortigo. Li malpermesas tion. (*Post momento.*) Sed —, se aliaj homoj ĵetus min en riveron?

Patrino. Ne timu tion, neniu faros ion tian!

Johano. Mi ja tute ne timas, ĉar mi irus en la ĉielon, kaj mi vidus Dion!

Patrino. Ne pensu kaj ne parolu pri tiaj aferoj, Johano! Estas pli bone, ke vi diligente plektu korbojn; tio distros vin kaj donos ripozon al via kompatinda cerbo.

Johano. Jes; estas pli bone, ke mi plektu korbojn. (*Oblikve rigardante la patrinon.*) Tamen mia estas la regno de la ĉielo. Kaj mi vidos Dion. Tio estas skribita en la biblio. (*Li komencas labori.*)

Post momento fulmas kaj tondras, kaj oni aŭdas, ke pluvas torente.

Johano (*iom post iom ĉesas labori, apogas la kapon je la dorsapogilo de la benko kaj fermas la okulojn*).

Patrino. Ho Dio, indulgu min! (*Rigardas al Johano.*) Li dormas, la kompatindulo! (*Ŝi preĝas flustrante, poste malfermas la biblion kaj legas mallaŭte, movante la lipojn.*)

Post momento iu frapas ekstere al la fenestro, dekstre.

Patrino. Kio estas tio? (*Atendas, rigardante la fenestron. — Dua frapado.*) Iu, kiu volas eniri tiel malfrue? (*Rigardas la horloĝon.*) Estas jam la deka horo. (*Tria frapado. — Ŝi leviĝas, iras al la fenestro kaj rigardas eksteren.*) Mi vidas neniun. Tamen iu frapis. (*La frapado aŭdiĝas sur unu el la pordoj en la fundo. Ŝi iras tien, forŝovas la riglilon kaj malrapide malfermas. Tuj poste ŝi pašas malantaŭen, surprizite.*) Alberto!!

Dua sceno.

Là Patrino, Johano, Alberto.

Alberto (*eniras, rapide fermas kaj riglas la pordon post si*). Patrino!!

Patrino. Alberto!!

(*Ili ĉirkaŭbrakas unu la alian.*)

Alberto. Vi laboris ankoraŭ, patrino?

KSIĄŻNICA PODLASKA im. Łukasza Górnickiego Nr ..... FILIA Nr 14 w Białymstoku

Patrino. Mi legis kaj estis enlitiĝonta. (*Palpas liajn vestojn.*) Kiel malseka vi estas!

Alberto. Jes, mi estas malseka. Pluvas ja torente.

Patrino. Kiel malfrue vi venas, mia knabo, kaj en tia vetero!

Alberto. Jam ne tondras. La malbona vetero pasis, mi pensas.

Patrino (*kisante lin*). Ho, kiel mi ĝojas, ĉar vi revenis! (*Karesas lin.*) Demetu la soldatan mantelon kaj la ĉapon, la akvo elfluas el ili — — Pendigu ilin sur la seĝodorso antaŭ la fajroloko, tie ili baldaŭ sekiĝos! Sed viaj botoj — kaj la pantalono estas ankaŭ tiel malseka — — Oni pensus, ke vi travadis rivereton, tiel malseka vi estas ĉie.

Alberto. Jes, patrino, mi estas tre malseka; sed tio ne estas grava.

Patrino. Ne grava!? Certe, tio estas tre grava. Surmetu tuj aliajn vestojn, viajn proprajn; ili pendas en la ŝranko. (*Ŝi iras al la ŝranko.*) Alie vi ja malvarmumus.

Alberto. Ne timu, patrino, mi jam ne malvarmumos, neniam plu.

Patrino. La soldatoj kutimiĝis al malbona vetero. Tamen ŝanĝu la vestojn! Ĉu vi venas permese?

Alberto. Ne. — Jes. — Permese. (*Li pendigas la surtuton sur la seĝodorson, poste li demetas la ceterajn vestojn; dume la Patrino prenas sekajn el la ŝranko kaj donas ilin al li.*)

Patrino. Kiom da tagoj vi restos? — Jen la sekaj, surmetu ilin tuj kaj sidiĝu! — Dio, kiel mi ĝojas! Tiel neatendite!

Alberto. Jes, tre neatendite. Kie estas Johano?

Patrino. Vi ankoraŭ ne vidis lin? Li sidas tie en la angulo de sia benko ĉe tiu duone plektita korbo. La dormo kaptis lin, la kompatindulon.

Alberto. Kiel li fartis dum la lastaj tagoj?

Patrino. Lia sano estas bona, sed lia spirito ne pliboniĝis. Lia memoro kelkfoje estas tre malforta, li memoras ordinare nur tion, kio interesas lin; la ceteron nur, se oni helpas al li; kaj li komprenas nur malrapide kaj nur, se oni parolas al li per mallongaj frazoj. Nun sidiĝu! Mi brogos kafon aŭ boligos lakton, tio varmigos vin post tia promeno en la malbona vetero. Ĉu vi deziras manĝi? Atendu, mi havas ankoraŭ — —

Alberto (*kun rifuza gesto*). Ne, patrino! Mi nek trinkos nek manĝos. Mi venis nur por — por adiaŭdiri — —

Patrino (*surprizite*). Por adiaŭdiri? Vi do ne venis permese?

Alberto. Ne. — Jes. — Mi ankaŭ venis permese, nur kelkajn horojn — —

Patrino. Nur kelkajn horojn?

Alberto (*post momento*). Jes, nur du —

Patrino (*malkvietiĝas*). Nur du? Sed tio estas terura!

Alberto. Jes, patrino, tio estas tre terura!

Patrino. Kaj kiam vi revenos?

Alberto (*levas la ŝultrojn, sed ne repondas*).

Patrino. Vi ne scias tion!? (*Kun timo.*) Vi do kuniros — Rusujon?

Alberto (*hezitante*). Rusujon? — Ne — jes — mi kuniros tien.

Patrino. Sed, Alberto, kiel strangaj kaj evitemaj estas viaj respondoj! Mi ja tute ne komprenas vin.

Alberto (*levas la ŝultrojn, sed ne respondas*).

Patrino (*maltrankviliĝas pli kaj pli*). Sed diru do — ĉu okazis io — stranga? — io?

Alberto. Ho, patrino! Io terura okazis.

Patrino (*terurite*). Io terura? Ĉu la milito eksplodis — kontraŭ Rusujo?

Alberto. La milito eksplodis jam antaŭ iom da tempo, tion vi ja scias. Mi ne intencis paroli pri la milito. (*Fingre montras Johanon.*) Ĉu li dormas?

Patrino. Jes, li dormas. — Sed kio do okazis? Io pli terura ol — ol tiu milito?

Alberto (*kapjesas, sed ne respondas*).

Patrino. Sed parolu do pli klare! Kio okazis?

Alberto. Mi ne venis por diri tion al vi, patrino; sed mi ja ne povas plu kaŝi la veron. Ho, ĉiopova Dio! (*Metas la brakojn sur la tablon kaj, kaŝante la vizaĝon inter ili, plor-singultas.*)

Patrino (*leviĝas, iras al li, metas la manojn sur lian kapon*). Sed, en la nomo de Dio, Alberto! Parolu do! Vi maltrankviligas min.

Alberto. Ho ve, patrino, mi ne povas — mi ne kuraĝas.

Patrino. Ĉu ĝi estas *tiel* terura?

Alberto (*eksidas rekte*). Sidiĝu, patrino, kaj mi ĝin rakontos.

Patrino (*eksidas kontraŭ li ĉe la tablo*). Ho Dio! Kio do pendas super mia kapo!?

Alberto (*post momento*). Post kiam mia patro mortis, Johano kaj mi devis labori por vi, kaj la ĉielo estas mia atestanto, ke estis al mi ĝuo tion fari. — Sed post la katastrofo, kiu faris Johanon simplulo, mi sola devis preni sur min tiun taskon, kaj mi estas sana kaj juna, kaj mi ŝatas labori. — Poste oni serĉis rekrutojn, mi devis loti kaj fariĝis rekruto. Tio estis la *dua* katastrofo, ĉar de post tiu momento vi sola devis labori por vi kaj por Johano; ĉar kvankam li plektas korbojn, li perlaboras per tio tiel malmulte, ke preskaŭ ne valoras la penon paroli pri ĝi. — Ĉiam mi esperis baldaŭ reveni hejmen por denove helpi kaj subteni vin. Sed la *tria* katastrofo venis: la milito kontraŭ Rusujo. Anstataŭ baldaŭ rehejmiĝi, mi devus marŝi kun la granda armeo, ĉar nur malmultaj restos tie ĉi. Mi ne bezonas diri, kiel tio malesperigis min, ĉar kia estus la sorto de vi kaj Johano, se mi neniam revenus —, kaj la ĉielo scias, kiom malmultaj revenos —, Rusujo estas tiel vasta — kaj tiel malproksima. Miloj da soldatoj falis jam sur la batalkampoj, kaj pereos ankoraŭ centoj da

aliaj miloj, ĉar la milito ne finiĝos tiel longe, kiel vivos la imperiestro. Sed ĉiuj tiuj pereantaj soldatoj ne kortuŝas la imperiestron. Li ĉiam kaj ĉiam bezonas novajn milojn. — Mi ne estas malkuraĝulo, sed kial oferi mian vivon por aferoj, kiuj interesas nur la imperiestron kaj ne nin? Se la patrujo estus en danĝero, kiel antaŭ kelkaj jaroj, sen kontraŭdiro, eĉ sen murmuroj mi partoprenus por defendi ĝin kontraŭ atakantaj malamikoj. Sed nun la afero estas tute alia, nun mi mem estos inter la atakantoj. Longe mi meditis pri tio, kion fari; fine mi decidis forkuri, tiamaniere mi ja havus la ŝancon poste reveni kaj labori por vi —, aŭ vi kaj Johano povus sekvi min en la fremdan landon, kaj tie ni povus kune vivi feliĉe kaj pace. Kaj mi forkuris, sed mi estis kaptata kaj ĵetata en la arestejon. Tie mi pasigis du terurajn semajnojn, ne pro mi mem, sed pro vi kaj li (*fingre montrante Johanon*). Hieraŭ la milita konsilantaro juĝis min — kaj kondamnis min — (*atendas momenton*).

Patrino. Kondamnis!? Al kio?

Alberto. Al la mortpuno —

Patrino (*volas ekstari, eligas laŭtan krion, svenas kaj glitfalas de la seĝo*).

Johano (*vekiĝas, rigardas kun miro siajn patrinon kaj fraton, sed restas sidanta senmove, aŭskultante kun streĉita atento*).

Alberto (*residigas la patrinon sur ŝian seĝon, kie ŝi malrapide rekonsciiĝas*). Trankviliĝu, patrino, vi vekos Johanon!

Patrino. Al mortpuno! Ho Dio, jen la *kvara* katastrofo! (*Subite.*) Sed kiel vi povis

veni ĉi tien post tiu kondamno? Vi ja estas libera! Forkuru tuj, aŭ — kaŝu vin — tion vi ja povas!

Alberto. Jes —

Patrino. Rapidu! Eble mi povas kaŝi vin ie — sur la mansardo, sub la pajlo. Vi ja estas libera!

Alberto. Jes, patrino, mi estas libera.

Patrino. Nu do!

Alberto. Nun mi estas libera; sed mi devas iri returne post unu horo kaj duona, ĉar morgaŭ jam frue en la mateno — je la sesa horo —

Patrino. Je la sesa —?

Alberto. — ĝi okazos.

Patrino. Kio?

Alberto. La *kvara* katastrofo.

Patrino. Tiuhore ili mortpafos vin?

Alberto. Jes, patrino.

Patrino *(vivege)*. Sed tio ne okazos, tio ne fariĝos! Vi ja estas libera, vi ja povas forkuri kaj savi vin!

Alberto. Tion mi povas, sed tion mi tamen *ne* povas, patrino.

Patrino. Sed kial vi ne povas?

Alberto. Pripensu, ke mi estas tie ĉi kun permeso! Sed je la tria horo mi devas montri min en la kazerno.

Patrino. Kaj se vi malestos?

Alberto. Mia honoro kaj mia konscienco malpermesas al mi iri *ne* returne.

Patrino. Sed, kara knabo, pensu do pri mi — pensu pri via frato!

Alberto. Tion mi faris; sed antaŭ ĉio mi devas pensi pri Huberto.

Patrino. Huberto?

Alberto. Jes, pri Huberto, la maljuna serĝento, kiu riskis sian propran vivon — nur, por ke mi lastfoje povu iri hejmen por adiaŭdiri vin —

Patrino *(rigardas Alberton, sed ne komprenas lin).*

Alberto. Huberto estas mia plej kara amiko, kvankam li estas mia superulo. Ni mortus unu por la alia, se estus necese — kaj se estus eble. Li okaze estas tiu, kiu kondukis min en la arestejon, kaj li preskaŭ malesperis pro tio; sed li devas plenumi siajn instrukciojn kiel soldato kaj kiel mia gardanto. Li ne povas aliigi la aferon nek malebligi la katastrofon. Li povis kaj kuraĝis nur kaŝe permesi al mi iri hejmen, por ke mi adiaŭdiru vin lastfoje. Sed je la tria horo mi devas refoje esti en mia arestejo.

Patrino. Kaj se vi *ne* estos tie?

Alberto. Tiuokaze mian amikon trafos tiu kvara katastrofo, ĉar li estas respoñda pri miaj faroj; li, kiel mia gardanto, devas zorgi pri tio, ke mi ne forkuru.

Patrino (*plorante*). Ho Dio, kompatu!

Alberto. Dio ne povas kompati tie ĉi, patrino; tion povas nur la imperiestro.

Patrino. La imperiestro? Mi iros al li; mi petegos lin surgenue. Li ja kompatos min kiel patrinon.

Alberto. Estos tro malfrue, kaj tute superflua peno. La imperiestro *neniam* kompatas en tiaj aferoj.

Patrino. Sed tio estas monstra! *(Tordante la manojn pro malespero.)* Ho, kion fari?

Alberto. Adiaŭdiri min, patrino, por la lasta fojo.

Patrino. Kaj poste vi reiros tien por esti mortpafata? Ho, estas tro terure — — Ĉu Dio neniam indulgos min? Ĉu ankaŭ nun Li ne helpos?!

Alberto. En militaj aferoj la imperiestro ŝajnas esti pli potenca ol la Ĉiopova mem.

(Mallonga paŭzo. Johano, kiu ĝis tiuj lastaj vortoj aŭskultis kun larĝe malfermitaj okuloj, refoje fermas la okulojn kaj restas sidanta sen movo.)

Patrino. Ĉu tiu serĝento jam havas la saman aĝon kiel vi? Ĉu li havas patrinon kaj duone idiotan knabon por prizorgi kiel vi?

Alberto. Li estas jam sesdekjara, mi supozas. Familion, kiom mi scias, li tute ne havas. Sed ĉio tio aliigas nek la situacion nek la aferon. Li devas plenumi siajn instrukciojn, jam li malatentis ilin por mi. Se tion oni ekscios, li estos punata kiel helpinto de forkuronto. Koncerne min, mi devas obei mian honoron. Mi promesis, mi ĵuris reveni, kaj mi reiros al la kazerno. — Restas al mi ankoraŭ unu horo por priparoli kun vi kelkajn aferojn — kaj poste mi devos foriri por neniam revidi vin kaj lin. *(Li fingre montras Johanon.*

plorsingultas, metas la brakojn sur la tablon, kaŝas la vizaĝon inter ili, dum lia korpo skuiĝas pro emocio.)

Patrino *(kun teruro, starante ĉe li).* Ankoraŭ *unu* horo! — Kompatema ĉielo, kion fari? *(Ŝi rigardas ĉirkaŭe en granda malespero.)* Ankoraŭ unu horo, kaj je la sesa mi — *(kovras siajn okulojn per la manoj).* Ho, tio ja estas neebla — neebla! *(Falas surgenue.)* Helpu, kompatu, granda Dio! *(Ŝi ekstaras, rigardas Alberton dum momento, poste ŝin kaptas subita ekpenso; mallaŭte:)* Jam tiel maljuna — sen familio — kaj li volus doni sian vivon por savi lin, se tio estus ebla — — — *(Ŝi ŝteliras al la ŝranko, elprenas du tasojn, enverŝas en unu kelkajn gutojn aa fluidaĵo el malgranda kuracil-botelo; poste — hezitinte momenton — ŝi enverŝas ankaŭ tiajn gutojn en la alian tason, rapide formetas la botelon, metas la tasojn sur la ŝrankon kaj sidiĝas rigardante al Johano por certiĝi, ke li nenion rimarkis de tio, kion ŝi faris. Johano tamen jam rimarkis ĉion, sed sidas refoje kun fermitaj okuloj kaj ŝajnigas dormi.)*

Alberto *(post momento, sekigante larmojn).* Jes, patrino, ankoraŭ unu horon mi povas esti ĉe vi. Kio estas por priparoli?

Patrino. Mi ne scias.

Alberto. Ne pri mi. Pri mi ĉio baldaŭ finiĝos, sed pri vi kaj Johano.

Patrino *(ekstaras, prenas per tremanta mano la laktujon de la breto, verŝas lakton en la du tasojn kaj metas ilin sur la tablon).*

Alberto *(rifuzas geste)*. Mi ne soifas, patrino. Kial mi soifus?

Patrino. Trinku tamen!

Alberto *(malplenigas tason, rigardas en la malplenigitan tason kaj remetas ĝin sur la tablon)*. Kio estos la sorto de vi kaj Johano, kiam mi estos — —?

Patrino *(trinkas ankaŭ; ŝiaj manoj tremas)*. Dio ja zorgos por ni. (*Paŭzeto*).

Alberto. *Eble* Li zorgos. (*Post momento.*) Ĉu tiu lakto estis malfreŝa, patrino?

Patrino. Jes, jam malfreŝa.

Alberto. Ĝi acidiĝis.

Patrino. Jes.

Alberto (*post momento*). Se la patro vivus ankoraŭ!

Patrino. Jes.

Alberto. — — Ĉi tiu lasta akcidento ne okazus.

Patrino. Vi tamen devus foriri kun la armeo.

Alberto. Jes; sed li povus zorgi pri vi kaj pri Johano; tiuokaze mi ne estus forkurinta. Sed mi forkuris, nur pro vi kaj pro Johano. —

Patrino. Jes, mia knabo, tion mi scias; nur pro ni. Unu katastrofo kaŭzis la alian.

Alberto *(rigardante al la fajroloko)*. O! Estas varme en la ĉambro; miaj vestoj baldaŭ sekiĝos.

Patrino. Jes, tre varme estas.

Alberto. Mi tamen ne sentis tion, kiam mi venis.

Patrino. Eble pro la vetero.

Alberto. Ne: ĉar post fulmotondro ĉiam plifreŝiĝas. Sed estas nun terure varme tie ĉi, tro varme. Mia kapo turniĝas.

Patrino. Eble pro nervemo.

Alberto *(post momento)*. Kiel peza fariĝas mia kapo! (*Volas ekstari, sed refalas sur la seĝon.*) Kiu horo estas? Mi ne povas distingi. Estas tro mallume — kaj la horloĝovitro estas tute nebulkovrita — — Ankoraŭ unu horo! (*Li ripozigas la kapon sur la tablo.*).

Patrino (*duondorme*). Dio, pardonu al mi! Mi ja estas patrino — kun du knaboj — kaj unu el ili estas tiel malfeliĉa — preskaŭ idiota —, la alia devas labori por li kaj por mi, kiam mi fariĝos tro maljuna por labori mem. — Kaj tiu serĝento estas maljuna viro, sen familio — kaj li ja volus doni sian vivon — por savi mian filon — — Ho Dio, pardonu al mi mian kulpon! Konsideru, ke mi agis tiel pro malespero! Konsideru, ke mi estas patrino — kaj tiel malfeliĉa! Ho, mia kapo! Kiel ĉio mallumiĝas — kaj la imperiestro ne indulgus — — (*Ŝi ankaŭ metas la brakojn sur la tablon kaj ripozigas la kapon sur ili. Malgranda paŭzo.*)

Johano (*kiu rigardis kun strečita atento jam kelkan tempon siajn patrinon kaj fraton, rekte eksidas tre malrapide kaj flustras:*) Ili dormas. Mi ne dormis. (*Li leviĝas kaj ŝteliras al la tablo, rigardas atente la dormantojn.*) Jes, ili dormas. (*Levas la fingron.*) Mi scias, kial ili dormas. (*Pripensas momenton.*) Mi scias. Kiam

mia kapo doloris, patrino ankaŭ en mian lakton enversis el tiu botelo. (*Fingre montras la ŝrankon.*) Kaj kiam mia kapo ne doloris plu, tiam mi songis (*levas la fingron*) pri la fumturo kaj pri la ŝtonoj — kaj mi svingiĝis — svingiĝis —, mi memoras, tio estis terura! Ili dormas kaj songas —, mi ne dormis, mi aŭskultis. Ili volas mortpafi lin. (*Levas la fingron kaj pripensas, poste li ŝteliras al la vestoj de Alberto kaj palpas ilin.*) Ili sekiĝis. (*Li prenas la ĉapon kaj surmetas ĝin, iras al la spegulo.*) Nun mi similas mian fraton. Nun neniu vidas miajn blankajn harojn. (*Li iras al la fajroloko, demetas siajn vestojn kaj surmetas unu post la alia tiujn de Alberto; poste li serĉas en la poŝoj de la soldata mantelo kaj elprenas la pasporton soldatan, kiun li malfermas; li ridetas kaj foliumas ĝin; poste li legas flustre:*) „Alberto Dupuis, naskiĝis la duan de januaro mil-sepcent-naŭdekdua.“ (*Al si mem:*) Tiam mi ankaŭ naskiĝis — la duan de januaro mil-sepcent-naŭdekdua. (*Legas plue:*) „Nazo — rekta; mentono — ronda; okuloj — brunaj; frunto — alta; haroj — nigraj.“ (*Parolante:*) Jes, haroj — nigraj, kaj la miaj estas blankaj, pro teruro. (*Li enpoŝigas la pasporton kaj butonumas la mantelon, ekstaras antaŭ la spegulo.*) Nun neniu vidas miajn blankajn harojn. Nun mi estas Alberto, la soldato, kiu estos mortpafata je la sesa horo. Jes, mi memoras. (*Li rigardas la horloĝon.*) Estas la dekunua kaj duono. (*Li pripensas momenton; poste li ŝteliras al la biblio, malfermas ĝin ĉe la lana fadeno, reiras mallaŭte al sia benko kaj legas flustre kaj ridetante:*

„Kaj vidinte la homamasojn, li supreniris la monton, kaj kiam li sidiĝis, liaj disciploj venis al li.

Kaj malferminte la buŝon, li instruis ilin, dirante:

Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.

Feliĉaj estas la plorantoj, ĉar ili estos konsolataj.

Feliĉaj estas la mildaj, ĉar ili heredos la teron.

Feliĉaj estas tiuj, kiaj malsatas kaj soifas justecon, ĉar ili satiĝos.

Feliĉaj estas la kompatemaj, ĉar ili ricevos kompaton.

Feliĉaj estas la kore puraj, ĉar ili vidos Dion!"

(Parolante:) Kiom da vortoj! Sed mia estas la regno de la ĉielo — mi vidos Dion — kiam mi estos mortinta. Sed mem-mortigo estas mortpeko. Ne estos mem-mortigo, se aliaj mortigos min. *(Fermas la biblion, turnas ĝin kelkajn fojojn kaj poste remetas ĝin sur la tablon, rigardas sin en la spegulo.)* Mi memoras: Patrino diris: Vi similas unu la alian kiel du gutoj da akvo. *(Tiras la ĉapon super la orelojn.)* Nun mi ne havas blankajn harojn. Nun mi estas la soldato Alberto Dupuis, naskiĝinta la duan de januaro mil-sepcent-naŭdek-dua — — *(Rigardas atente la dormantojn.)* Ili dormas. *(Ridetas.)* Mi ne dormis. Mi aŭskultis. Mi scias, kie la kazerno staras — kaj la serĝento nomiĝas —, tion mi ne memoras plu. Sed li

estas la serĝento. Li arestas. — Mia estas la regno de la ĉielo. Mi vidos Dion! — Kaj ne plektos plu korbojn! Ĉio tio estas skribita en la biblio. (*Ridetas, pripensas momenton kaj sur la piedfingroj iras al la pordo, dekstren. Li malfermas ĝin, singarde eliras kaj refermas la pordon post si. Alberto kaj la patrino daŭrigas dormi.*)

La kurteno falas.

INTERAKTO.

Aktoroj.

Kapitano
Oficiro
Serĝento Petit
Kaporalo
Unua soldato
Dua soldato
Tria soldato
Kvara soldato
Kvina soldato

} Deĵorantoj en la kazerna gardejo.

Du armitaj soldatoj, kun serĝento.
Serĝento Huberto.
Johano, ekzekutota forkurinto.

Scenejo.

En la fundo dekstre larĝa pordo; maldekstre mallarĝa pordo. Maldekstre ĉe la flankmuro longa, larĝa, oblikva soldatripozejo el ligno sen kovrilo. Dekstre ĉe la kontraŭa flankmuro en la mezo tre larĝa fenestro, tra kiu oni vidas la internan korton de la kazerno. Antaŭ tiu fenestro staras paralele kun la fundo larĝa tablo kaj antaŭ ĝi senapogila benko. Sur la muroj pendas armiloj kaj bildoj kaj afiŝoj. Dekstre ĉe la flankmuro staras ses pafiloj.

Unua sceno.

Kaporalo kaj kvin soldatoj. Serĝento Petit.

Sur la ripozejo kuŝas unu flanke de alia la Kaporalo kaj la kvin soldatoj. La Kaporalo kuŝas plej proksime ĉe la rigardantoj. Sur la benko sidas Serĝento Petit; li fumas. Li havas longajn lipharojn, senharan kapon, severan, brutan eksterajon kaj ruĝan nazon. Li estas duone ebria. — Estas la kvina horo en la mateno kaj iom mallume. — La kvina soldato sur la ripozejo, plej proksime ĉe la fundo, laŭte ronkas.

Serĝento Petit *(post momento, vokas)*. Pichot! Pichot!

Unua soldato *(eksidas)*. Kio estas, serĝento?

Serĝento Petit. Kiu pro la diablo tiel ronkadas?

Unua soldato. Tio estas Dubois, kiu ronkadas, serĝento.

Serĝento Petit. Tion mi pensis. Donu al li piedbaton, por ke li ĉesu!

Unua soldato. Maleble, serĝento!

Serĝento Petit *(pli laŭte)*. Maleble!? Nenio estas malebla en la kazerno. Donu al li fortan piedbaton, mi diras ankoraŭ unu fojon!

Unua soldato. Por tio miaj kruroj estas multe tro mallongaj. Dubois kuŝas tro malproksime — tuj apud la muro, jen!

Serĝento Petit *(koleretas)*. Levu vin kaj faru, kion mi ordonis al vi!

Unua soldato *(leviĝas tre malrapide, iras sur la piedfingroj al la kvina soldato kaj donas al li fortan piedfrapon; poste li rapide, sed senbrue reiras al sia loko, kie li refoje sidiĝas)*.

Kvina soldato *(subite eksidas, frotetas sian piedbatitan kruron)*. Kiu diablo vekis min — en tia maniero?

Unua soldato. *Mi* estas tiu diablo, por servi al vi.

Kvina soldato *(koleretas)*. Sed kion signifas tio? Piedfrapu vian patrinaĉon, sed ne min — en tia maniero!

Unua soldato. Mi ne estas kulpa. Mi piedfrapis *laŭ alta ordono* — por servi al vi. *(Li kuŝiĝas.)*

Kvina soldato *(mirigite)*. Kaj kiu estas tiu alt-ordonanto, mi petas?

Serĝento Petit. *Mi* estas.

Kvina soldato. Ĉu vi ordonis, ke Pichot piedfrapu min, serĝento, — en tia maniero?

Serĝento Petit. Ĉu vi direktas nedecajn demandojn al via superulo, soldato Dubois — *(imitante lin)* — en tia maniero?

La aliaj soldatoj (*ridas*).

Kvina soldato. Ne ofendiĝu, serĝento, sed mi ja dezirus scii, kial tiu kanajlo Pichot vekas min piedbate, en tia...

La aliaj soldatoj *(ridas)*.

Serĝento Petit. Laŭ la reguloj de la gardejo estas malpermesite, ke iu rompu la ordon.

Kvina soldato *(surprizite)*. Ĉu *mi* rompis tiun ordon? Tion mi ja dezirus demandi.

Serĝento Petit. Ne direktu demandojn al via superulo!

La aliaj soldatoj *(ridas)*.

Kvina soldato. Jen la afero fariĝas pli kaj pli mistera.

Serĝento Petit. Ĉi tiun fojon mi klarigos al vi tiun misteron. Vi rompis la ordon en la gardejo, ĉar vi ĝenis la dormon de la ripozantaj soldatoj per via eterna — enuiga — diabla — kanajla ronkado. Ĉu vi komprenas?

Kvina soldato. He! Ĉu mi ronkis? En tio mi tamen ne estas kulpa. Mi ronkas, mia patro ronkas, mia avo ronkas, kaj eble ankaŭ mia praavo ronkis. Tio ŝajnas esti familia specialaĵo kiu —

La aliaj soldatoj *(ridas)*.

Serĝento Petit *(kolere interrompante)*. — kiu havigos al vi multajn kaj ankoraŭ pli fortajn piedbatojn, se vi ne malkutimiĝos ronkadi en la tempo, kiam ripozas aŭ dormas la soldatoj en la gardejo! Ĉu vi komprenas?

Kvina soldato. Jen bela afero! Kiel mi povos malkutimiĝi — tiun familian speci— ?

Serĝento Petit. Ne direktu demandojn al superulo! Eksilentu, dormu, sed ne ronku!! Ĉu vi komprenas?

La aliaj soldatoj *(ridas)*.

Serĝento Petit. Ne ridu! *(Li rigardas tra la fenestro. Post momento:)* Atenton ĉiuj! Jen la kapitano, kiu venas!

Ĉiuj *(ekstaras antaŭ la dormejo en strecita pozo)*.

Dua sceno.

La antaŭaj. La Kapitano.

Kapitano *(eniras tra la maldekstra pordo)*. Ĉiuj aliaj *(salutas)*.

Kapitano *(rigardas ĉirkaŭe; al la serĝento:)* Nenio nova, serĝento?

Serĝento Petit *(salutante)*. Jes, kapitano. La forkurinta Alberto Dupuis estos ekzekutata je la sesa horo.

Kapitano *(severe)*. Ĉu vi mokas min, serĝento? Tio tute ne estas io nova, eĉ ne io eksterordinara. Tiom da forkurintoj estas jam ekzekutitaj — preskaŭ ĉiutage — — *(Post momento.)* Nenio alia?

Serĝento Petit. Nenio, kapitano.

Kapitano. Ĉu la serĝento Huberto sin ne prezentis denove post sia malsano?

Serĝento Petit. Ne, kapitano. Li sin ne prezentis denove. Li estas ankoraŭ malsana.

Kapitano. Mi ne komprenas tion. Hieraŭ li estis sana kiel fiŝo en akvo. *(Al si mem:)* Li fariĝis eble tro maljuna.

Serĝento Petit. Li ja resaniĝos baldaŭ, kapitano.

Kapitano. Kiel vi scias tion?

Serĝento Petit. Li estas forta —, malsaniĝas preskaŭ neniam.

Kapitano (*al si mem*). Mi komandos alian serĝenton por ĉeesti la ekzekutadon. (*Rigardas ĉirkaŭe kaj foriras tra la maldekstra pordo.*)

Paŭzeto.

Tria sceno.

La antaŭaj sen la Kapitano.

La soldatoj kaj la Kaporalo (*rekuŝiĝas sur la dormejo*).

Serĝento Petit (*rigardante tra la fenestro*). Tiu ne revenos en la unua kvarono da horo. (*Al la Kaporalo:*) Mi devas foriri por kvin minutoj, kaporalo. Prenu la komandon dum tiu tempo! Zorgu pri tio, ke la ordo ne estu rompata! Ĉu vi komprenas? (*Li foriras tra la dekstra pordo.*)

Kvara sceno.

La samaj sen la Serĝento.

Kaporalo (*leviĝas kaj sidiĝas ĉe la fenestro; imitante la voĉon de la Serĝento*). Ĉu vi komprenas? Neniu rompu la ordon! (*Ridetas moke.*)

Kvina soldato. Mi ne ronkos, kaporalo.

La aliaj (*laŭte ridas*).

Dua soldato. Jen la alta ordonanto — foriris.

Tria soldato. Jam la trian fojon en la lasta horo.

Kvina soldato. Dio scias, kion li ĉiufoje faras ekstere — dum la gardado. — *Mi* ne scias.

Kvara soldato. Mi ankaŭ ne. Eble en la kantino oni scias tion.

Dua soldato. Ĉu oni pentras tie la nazojn?

Kvara soldato. Jes, tie oni pentras ilin ruĝe.

Kaporalo. Eksilentu, ne moku la nazon de superulo!

Kvina soldato. Kiel mi diris: *Mi* ne scias, kial la alta ordonanto tiel ofte — eliras; sed mi scias ion tute alian — kion neniu el vi scias — eĉ ne la serĝento.

Kaporalo. Kion do? Eldiru!

Kvina soldato. Mi scias, kial la serĝento Huberto malsaniĝis.

Kaporalo. Nu, kial?

Kvina soldato. Mi tion diros je unu kondiĉo.

Kaporalo. Konsentite, parolu!

Kvina soldato. Je la kondiĉo, ke neniu el vi piedbatu min, kiam mi ronkos.

Unua soldato. Ekzemple kiel lastfoje; sed tion la serĝento ordonis. Mi devis obei.

Kvina soldato. Jes, li ordonis. Tio okazis laŭ alta ordono. Sed vi ne bezonis piedfrapi — en tia maniero!

Unua soldato. En kia maniero, nome?

Kvina soldato. Tiel forte!

Unua soldato. Mi tamen ne estas kulpa, ke mia boto estas tiel malmola.

La aliaj (*ridas laŭte*).

Kaporalo. Nu, trankviliĝu! *Mi* ne ordonos tion, eĉ se vi ronkos. Kaj se la serĝento ordonos ... nu, la ordonoto povos piedfrapi tre malforte ... Nun eldiru vian sekreton!

Kvina soldato. Serĝento Huberto malsaniĝis, ĉar li ne volas ĉeesti la ekzekutadon de Dupuis.

Kaporalo. Jen!! Kiel vi scias tion?

Kvina soldato (*aŭskultas, ĉu iu venas; post momento*). Hieraŭ vespere mi staris garde ĉe la kazernpordego. Subite venis al mi serĝento Huberto. „Dubois!" li diris. „Aŭskultu! Post kvin minutoj mi kondukos eksteren soldaton. Ne atentu lin! Li faros por mi malgrandan komision kaj revenos post kvar horoj. Enlasu lin tiam, sed ne rigardu, ne atentu lin!" — Mi diris: „Bone, serĝento; se li venos de dekstre, mi turnos min tute okaze maldekstren, kaj se li venos de maldekstre, mi turnos min dekstren ..., tiamaniere mi ne povos vidi lin." — La serĝento foriris kaj revenis tuj poste kun la mistera eliranto. Vi komprenas, ke mi estis scivola kaj, tute okaze turnante min dekstren, ĉar li venis de maldekstre, miaj okuloj intence turnis sin maldekstren — kaj kiun, laŭ via opinio, mi vidis?

Kaporalo. Kantinistinon!

Kvina soldato. Kantinistinon? Kun via permeso, kaporalo, la serĝento estas sufiĉe belaspekta viro, sed multe tro maljuna por kantinistino. La kantinistinoj pli volonte
kun junaj kaporaloj. (*Ĉiuj ridas*

Kaporalo. Ne ridu! Nu, daŭrigu, Dubois! Via sekreto fariĝas interesa.

Kvina soldato. Mi rakontos plue; sed silentu! Memoru, ke ĝi estas sekreto! (*Aŭskultas, ĉu iu venas; flustre*:) Tiu mistera dumnokta eliranto estis — Dupuis.

Ĉiuj (*surprizite*). Dupuis!?

Kvina soldato. Ŝt... Ŝt...! Ne kriu tiel laŭte! Min preskaŭ atakis miaj nervoj, ĉar mi pensis: Eble mi estos responda pri la forkuro de tiu dumnokta eliranto. Sed mi tuj ekpensis pri la vortoj de la serĝento, ke tiu misterulo revenos post kvar horoj. Tamen vi komprenas mian maltrankvilon, mi ne dormis en la ripozhoroj.

Kaporalo. Kaj vi ne ronkadis —

Kvina soldato. Kompreneble, mi ne ronkadis kaj ne rompis la ordon en la gardejo; sed mi nur pripensis mian malagrablan situacion. Fine mia vico revenis por stari garde ĉe la pordego, kaj mi staris tie kun la teruro en mia stomako, timante ke Dupuis ne revenos. Sed feliĉe je la interkonsentita horo li reaperis. Li estis tirinta la ĉapon trans la oreloj n kal kaŝis la kapon inter la levitaj ŝultroj; sed mi rekonis lin kaj ĝojis kiel pendumito, kiam neatendite la ŝnuro disŝiriĝas. La serĝento jam duonan horon atendis lin en angulo post la pordego, kaj duope ili pasis preter mi kaj malaperis sur la korton.

Kaporalo. Tio estas misteraĵo! Kion do Dupuis faris ekster la kazerno?

Kvina soldato. Tion mi ne scias; sed mi scias, ke li estas bona amiko de la serĝento, kaj la serĝento ne volas ĉeesti lian ekzekutadon — tio estas klara —, kaj tial li anoncis sin malsana. (*Paŝoj aŭdiĝas.*) Ŝt... Ŝt...! La alta ordonanto revenas!

Kvina sceno.

La antaŭaj. La Serĝento Petit.

Serĝento Petit (*revenas; li estas ankoraŭ pli ebria; li sidiĝas ĉe la fenestro kaj fumas. Post momento li metas la poŝhorloĝon sur la tablon kaj rigardas ĝin*). Ankoraŭ dudek-ses minutoj, kaj refoje unu transportiĝos en la alian mondon. La malsaĝulo! Kial forkuri? Li jam antaŭe sciis, kio rezultos el tio. (*Ridante.*) Forkuri!! Kien forkuri? Kvazaŭ ĉiuj vojoj estus malfermitaj por forkurantoj de la Granda Armeo! Mil diabloj! Tio estus io bela, se ĝi estus tiel facile farebla. Ni havas sufiĉajn rimedojn por rekapti ilin ĉiujn, kaj se la milita konsilantaro ne farus finon al tiu diabla forkurado, hm!, tiuokaze restus eble neniu soldato en la kazerno. Imagu tian situacion! Kazerno sen soldatoj — serĝentoj sen subuloj! Kiel tiam la „malgranda kaporalo", la imperiestro, trudus sian altan volon al tiu rusa urso? — Mi diras: Ni bezonas ekzemplojn timigajn por forigi ĉe la soldatoj ĉiun deziron forkuri. (*Al la soldatoj.*) Pripensu tion, buboj! Zorgu pri tio, ke oni ne uzu vin kiel tian timigan ekzemplon, — pripensu tion! (*Rigardas sian poŝ-*

horloĝon.) Kaj post dudek-kvar minutoj vi spertos, kiel tia ekzemplo efikas. Kaj se vi demandas min, ĉu mi kompatas la malsaĝulojn, kiujn oni devas transporti en la alian mondon, por ke tio servu kiel ekzemplo, — mi metas mian manon sur la koron kaj malkaŝe diras: Kompaton por ili mi tute ne sentas. *Ni* ne mortpafas ilin, ili mortpafas sin mem — propravole, ĉar ili scias antaŭe, kio okazos, se la freneza ideo forkuri kaptas ilin. (*Rigardante la poŝhorloĝon:*) Ankoraŭ dudek-tri minutoj pasos, kaj vi spertos la efikon. Kaj se vi deziras, vi povos vidi la spektaklon. (*Li montras la korton per la mano.*) Vi povas esti spektantoj starante ĉe tiu ĉi fenestro. Jen la muro, antaŭ kiu ili starigos lin. Se vi kuraĝas, vi povos vidi ĉion. (*Al la unua soldato.*) He, Pichot, ĉu vi deziras vidi ĝin?

Unua soldato. Mi prefere restas kuŝanta tie ĉi, kun via permeso. Mi ne ŝatas tiajn vidaĵojn.

Serĝento Petit. Hontu! Ĉu vi estas soldato de la Granda Armeo?

Unua soldato. Ne ofendiĝu, serĝento, oni ja povas esti soldato de la Granda Armeo kaj tamen ne ŝati tian spektaklon.

Serĝento Petit. Ĝi apartenas al la metio. Imagu, ke vi mem apartenas al la taĉmento, kiu devas mortpafi tian forkurinton!

Unua soldato. Mi esperas, ke la ĉielo indulgos min.

Serĝento Petit. Sensencaĵo! (*Al la dua soldato.*) Kaj vi? He, ruĝharulo! Ĉu vi deziras vidi ĝin?

Dua soldato. Ne, mi ankaŭ ne, serĝento.

Serĝento Petit (*mokimitante lian voĉon*). „Ne, mi ankaŭ ne, serĝento!“ — Kaj ankaŭ vi estas soldato de la armeo de Napoleono!? Kaj vi akompanos lin al Rusujo por malsovaĝigi tiun urson!? Pa! (*Al la tria soldato.*) Kaj vi, numero tria?

Tria soldato. Ankaŭ mi ne, serĝento.

Serĝento Petit (*mokimitante lian voĉon*). „Ankaŭ mi ne, serĝento!“ Kiaj herooj! Oni tuj vidas el tio, ke vi ankoraŭ neniam partoprenis grandan batalon kiel mi. Mi partoprenis: Wagram, Austerlitz kaj tiel plu — kaj post tiaj travivaĵoj oni ja tute ne atentas la ekzekutadon al unu sola forkurinto. Kaj vi iros Rusujon!?

Tria soldato. Tion mi devas, kun via permeso, kaj tion mi faros. Sed propravole rigardi la mortpafadon al kamarado, por tio, malkaŝe dirate, mi ne tre taŭgas.

Serĝento Petit (*moke*). Kamarado! Kamarado! Li nomas forkurinton „kamarado“! Ankoraŭ dudek minutoj, nek pli nek malpli! La tempo estas precize fiksita. Ordo devas regi en la Granda Armeo. (*Al la kvara.*) Sed vi ja certe estos spektanto, ĉu ne, Boulangé?

Kvara soldato. Jes, mi volas vidi ĝin. (*Iras al la fenestro kaj sidiĝas sur la benko.*)

Serĝento Petit (*frapas lian ŝultron*). Vi estas viro! Tion mi devas konfesi. Ĉu estas la unua fojo, ke vi tion vidas?

Kvara soldato. Jes, la unua fojo.

Serĝento Petit. Vi avancos en la armeo. Vi fariĝos iam serĝento aŭ kaporalo. Nu, estas al mi plezuro, ke almenaŭ unu el la soldatoj pruvas, ke li havas kuraĝon. (*Al la kvina soldato.*) He, ronkulo, kaj vi?

Kvina soldato. Ne, serĝento, ne ofendiĝu! Mi ne kuraĝas, mi volas konfesi tion.

Serĝento. Vi ne kuraĝas. Vi ne kuraĝas. Kompreneble vi ne kuraĝas. Vi kuraĝas konfesi vian malkuraĝecon — kaj ronkadi, se la aliaj dormas. Se mi estus imperiestro, mi mortpafigus ĉiujn tiajn malkuraĝulojn.

Kvina soldato. Kiel mi ĝojas, ke la „malgranda kaporalo" estas la imperiestro.

Serĝento (*koleriĝas*). Eksilentu! Ĉu vi komprenas?

Kvina soldato. Ĉu eksilenti, ĉar mi diris tion? Tion mi kuraĝas diri mil fojojn ĉiutage, eĉ se ĉiuj serĝentoj malpermesus ĝin.

Serĝento (*kolere*). Jes, vi kuraĝas. Vi estas granda kuraĝulo, tion mi scias. (*Al la kaporalo.*) La kaporalo nature kuraĝas rigardi la ekzekutadon, ĉu ne, kaporalo?

Kaporalo. Nature!

Serĝento. Nu, al ĉiu estas permesate rigardi — aŭ ne rigardi. (*Kun surprizo.*) Diablo, kaporalo — vi ne fumas!

Kaporalo. Ne, serĝento, mi ne fumas.

Serĝento. Jen io eksterordinara, kion mi raportos al la kapitano, se li revenos. Alitempe vi ja fumas konstante la tutan tagon, kaj nun vi sidas tie sen via pipo — kaj ne fumas?

Kaporalo. Mia pipo rompiĝis — kaj mi havas dentdoloron, serĝento.

Serĝento. Dentdoloron? Elŝiru tiun denton!

Kaporalo. Kun via permeso —, estas tri jam eliĝintaj dentoj jen en la antaŭa parto de l' buŝo, kiuj tiel doloras min.

Serĝento. Jen refoje io eksterordinara por raporti! Eliĝintaj dentoj, kiuj doloras. Hahaha! (*Rigardante la poŝhorloĝon:*) Ankoraŭ dek-sep minutoj! Kiel rapide pasas la minutoj! Ĉu la regimenta doktoro elŝiris ilin?

Kaporalo. Speciala doktoro faris tion laŭ neordinara maniero kaj per speciala denttirilo.

Serĝento. Ne moku superulon, mi petas, ĉar ankaŭ tion mi devos raporti al la kapitano.

Kaporalo. Mi ne mokas, serĝento. Speciala dentisto persone forigis ilin — per speciala denttirilo.

Serĝento. Elbatis ilin?

Kaporalo. Ne elbatis, ne elŝiris, sed forigis ilin laŭ speciala maniero.

Serĝento. Hehe!

Kaporalo. Aŭskultu! Vi scias, ke mi estas pasia fumanto. Ĉiam mi fumas, eĉ se mi kuŝas sur tiu ripozejo. Hieraŭ mi promenis sur la korto kaj —

Serĝento. — kaj fumis —

Kaporalo. — mi fumis, sed sur loko, kie tio estas malpermesita.

Serĝento. Diablo! Apud tiu magazeno —

Kaporalo. Jes, pro la malmulto da pulvo, kiu estas konservata tie en fera kesto — kaj sur bone kaŝita loko —

Serĝento. Ne faru tiajn rimarkojn, mi petas! Sed rakontu plue!

Kaporalo. La kapitano tion ekvidis kaj forbatis la pipon per la pugno; sed mi antaŭvidis la baton kaj ĝustatempe malfermis la buŝon —

Serĝento. Tio estis saĝe farita.

Kaporalo. Mi ĝojis, ke la afero finiĝis per tio. Sed kiam la kapitano estis for, mi rekaptis mian pipon kaj denove ekfumis.

Serĝento (*surprizite*). Sur tiu sama loko?

Kaporalo. Ho ne! Tion mi ne kuraĝis. Sed aŭskultu plue! Du horojn poste mi ne pensis pli pri la pugnobato de la kapitano kaj denove mi promenis tre okaze sur tiu sama loko kun la pipo en mia buŝo —

Serĝento. Kaj vi fumis?

Kapitano. Jes, mi fumis. Subite iu, kiun mi ne estis vidinta, ordonis post mi: „Kaporalo, atenton!“ — Mi ekhaltis.

Serĝento. Nature, vi ekhaltis.

Kaporalo. Tiu sama voĉo ordonis plu: „Kapo... dekstren!“ Mi obeis. Poste tiu sama voĉo ordonis: „Senmove!“ Kaj mi staris senmove, tute ne komprenante la sencon de tiuj ordonoj. Mi atendis pluan ordonon; sed subite pistola pafo eksplodis post mi, kaj samtempe malaperis mia pipo kaj tri el miaj belaj dentoj.

Serĝento. Hahaha! Mil diabloj! Tio estis bone trafita! Mi admiras tiun pafinton —

Kaporalo. Kaj tiu pafinto, kiun vi tiel admiras, estis, kun via permeso, la kapitano proprapersone.

Serĝento. Mil diabloj! Kaj kion li diris — post tiu pafo?

Kaporalo. Nenion. Li iris for, eĉ ne rigardante min plu kaj lasis min tie sen mia pipo kaj sen miaj belaj dentoj. Kaj tial mi nun ne fumas.

Serĝento. Hahaha! (*Al la aliaj*:) Kaj pro tio vi nun ne ridas? Ho, mi komprenas — vin iom post iom kaptas la teruro pro tiu fariĝonta, alia pafo! (*Rigardas la poŝhorloĝon.*) Ankoraŭ dek-tri minutoj! (*Oni aŭdas la paŝojn de alproksimiĝantaj soldatoj.*) Jen ili venas. Atenton!

La kvar soldatoj sur la ripozejo ekstaras antaŭ ĝi. La Serĝento Petit, la Kaporalo kaj la kvara soldato ĉe la fenestro ekstaras ankaŭ.

Eksterscene je la fundo marŝas preter la malfermita dekstra pordo deko da armitaj soldatoj kun oficiro kaj serĝento. Kiam la lasta soldato preterpasis, ili ĉiuj ekhaltas.

Sesa sceno.

La antaŭaj, Serĝento kun du armitaj soldatoj, Johano, Oficiro.

Eniras la Serĝento kun du el la armitaj soldatoj: meze de la du soldatoj estas Johano. Ili ekhaltas en la mezo de la scenejo. Johano

staras inter la du soldatoj, la Serĝento post Johano.

Post momento eniras Oficiro; li eksidas ĉe la tablo, elpoŝigas kelkajn paperojn, metas ilin sur la tablon kaj ekzamenas ilin.

Oficiro *(post momento, al Johano)*. Ĉu vi estas la forkurinto Dupuis?

Johano (*ne respondas*).

Serĝento (*puŝas lin per la kubuto*). Respondu!

Oficiro *(pli laŭte)*. Ĉu vi estas la forkurinto Dupuis?

Johano. Jes... Dupuis... naskiĝinta la duan de januaro mil sepcent naŭdek dua...

Oficiro (*iom surprizite, ekzamenas la antaŭ li kuŝantajn paperojn)*. Tio akordiĝas kun la dokumentoj.

Johano *(daŭrigas, altigante la fingron)*. Nazo — rekta; mentono — ronda; okuloj — brunaj; haroj —

Oficiro (*interrompas lin*). Kaj tiel plu. Sufiĉas! Respondu nur al tio, kion *mi* demandos. — Vi scias, ke vi forkuris el la armeo kaj jam konfesis tion. Vi scias ankaŭ, ke tiu forkuro estas krimo kontraŭ la patrujo kaj estas punata per mortpuno.

Johano. Oni mortpafos min.

Oficiro. Kompreneble, oni mortpafos vin — kaj eĉ post kelkaj minutoj. Sed antaŭe mi devas demandi, ĉu vi havas ankoraŭ kelkajn plenumeblajn dezirojn. Respondu!

Johano (*ne respondas, levas la fingron kaj rigardas la oficiron kun streĉita atento*).

Oficiro. Respondu! Ĉu vi havas kelkajn plenumeblajn dezirojn?

Johano *(atendas momenton, tiam subite)*. Mi havas.

Oficiro. Kiaj estas tiuj deziroj?

Johano. Ke mia patrino ne ŝpinu plu!

Oficiro *(surprizite)*. Ke... kion!?

Johano. Ke mia patrino ne ŝpinu plu!

Oficiro *(levas la ŝultrojn)*. Tio estas afero, pri kiu la armeo ne povas okupi sin. Ŝi ŝpinu aŭ ne ŝpinu laŭ sia propra plaĉo. (*Li atendas momenton.)* Ĉu vi havas alian plenumeblan deziron?

Johano *(pripensinte)*. Mi dezirus ne plu plekti — —

Oficiro. Plekti!?

Johano. — — korbojn!

Oficiro *(levante refoje la ŝultrojn)*. Ne parolu sensencaĵojn tie ĉi! Mi demandas denove: Ĉu — vi — havas — plenumeblajn — dezirojn?

Johano *(pripensinte)*. Mi deziras vidi Lin!

Oficiro *(surprizite)*. Lin? — Kiun?

Johano. Dion.

Oficiro. Ne ŝajnigu esti idiota! Tiajn artifikojn ni konas. Lastfoje mi demandas: Ĉu vi havas konsenteblajn dezirojn?

Johano. Mi ne estas idioto. Mi estas malriĉa en spirito; tio estas skribita.

Oficiro. Sufiĉas! *(Li ekstaras, enpoŝigas la dokumentojn, donas signon al la serĝento, kiu staras ĉe Johano.)*

(La Serĝento kun la du armitaj soldatoj, kiuj puŝas Johanon eksteren, foriras tra la pordo, dekstren. La Oficiro sekvas ilin fermante post si la pordon.)

Sepa sceno.

Samaj personoj kiel en la unua sceno.

La Serĝento, la Kapitano kaj la kvara soldato eksidas ĉe la fenestro, la aliaj restas starantaj antaŭ la dormejo.

Serĝento Petit *(rigardas sur la korton; al la kaporalo).* Jen la spektaklo estas komenciĝonta. *(Al la soldatoj antaŭ la dormejo.)* Nu, ĉu ne troviĝas rigardemuloj inter vi? Ĉi tie estas ankoraŭ sufiĉa loko. *(Ili ne respondas, sed aŭskultas eksteren.)*

Oka sceno.

Samaj personoj. Serĝento Huberto.

Serĝento Huberto *(rapide eniras tra la maldekstra pordo en la fundo kaj ekhaltas post la pordo, kiun li tuj fermas, nervoze).* Ĉu ili estas for?

Serĝento Petit. He, Huberto! Ĉu vi resaniĝis?

Serĝento Huberto. Ili estas jam sur la korto? Kiu horo estas?

Serĝento Petit (*rigardas la poŝhorloĝon*). Ankoraŭ tri minutoj. (*Montras fingre la benkon.*) Sidiĝu, kaj vi povos vidi ĉion.

Serĝento Huberto. Mi ne venis por vidi ĝin.

Serĝento Petit. Kial do vi venis?

Serĝento Huberto. Por enterigi lin.

Serĝento Petit (*rigardante refoje la poŝhorloĝon*). Ankoraŭ du minutoj.

Serĝento Huberto (*apogas, turnante sin, la kubutojn kontraŭ la pordo kaj kaŝas la vizaĝon en la manojn*).

(*Unu el la soldatoj antaŭ la ripozejo kovras siajn orelojn, la aliaj rigardas terurite antaŭ sin.*)

Serĝento Petit. Ankoraŭ unu minuto! Rigardu, kaporalo, kiel rekte li staras! Li tamen estas pli kuraĝa ol mi supozis. Ordinare la forkurintoj estas malkuraĝuloj. Ankoraŭ duona minuto! Kiajn malsaĝajn respondojn li donis! — Jen ili celas! Jen vi havos!

(*Oni aŭdas salvon. La kvara soldato ĉe la fenestro forkuras terurite al la ripozejo.*)

Serĝento Petit. Transportita! (*Frapas per la pugno sur la tablon; poste li kaj la kaporalo subite ekstaras kaj rigardas eksteren.*)

La kurteno falas rapide.

LASTA AKTO.

Aktoroj kaj **Scenejo** kiel en la unua akto.

Estas la naŭa horo en la mateno.

La Patrino kaj Alberto sidas ankoraŭ ĉe la tablo, kiel je la fino de la unua akto.

Mallonga paŭzo, kiam la kuiteno leviĝas; poste tre malrapide Alberto vekiĝas, fine li levas la kapon kaj rigardas surprizite antaŭ sin kvazaŭ en sonĝo.

Unua sceno.

La Patrino, Alberto.

Alberto. Kie mi estas? Kio okazis? Ĉu mi dormis? (*Li ekvidas la dormantan patrinon kaj eksidas rekte sur sia seĝo.*) Patrino! Ŝi ankaŭ dormas. Kiel lume estas! (*Rigardas la horloĝon.*) Kiu horo? (*Surprizite.*) Jam la naŭa?! Sed tio estas neebla! (*Terurite.*) Dio, kio okazis ĉi tie? (*Laŭte vokante.*) Patrino! Patrino! (*Iras al ŝi kaj skuas ŝin.*) Patrino! Vekiĝu! — Kara ĉielo! Jam tiel malfrue, kaj je la tria mi devis refoje esti en la kazerno! (*Pli laute.*) Patrino! Patrino! (*Skuas ŝin pli forte.*) Vekiĝu!

Patrino (*vekiĝas malrapide, levas la kapon kaj rigardas lin demande; poste ŝi diras subite*): Kiu horo estas?

Alberto. Jam la naŭa. Kio do fariĝis? Kio okazis kun ni? Ni dormis, kaj je la tria mi devis esti returne en la kazerno.

Patrino. Jes, je la tria.

Alberto. Sed komprenu do! Estas jam la naŭa!

Patrino. Kaj tro malfrue por reiri tien.

Alberto. Sed, patrino! Tio estas terura! Komprenu do, Huberto estas responda, lin oni ekzekutos, se mi ne revenos! Ho, kara ĉielo, tio eble jam okazis!

Patrino (*terurite*). Vi tamen diris, ke li volonte donus sian vivon por savi vin.

Alberto. Kion vi diras? Ha, vi —!

Patrino (*terurite*). Kompatu min, Alberto — — Mi ne sciis — ne pripensis, kion mi faris.

Alberto. Kion vi faris? Vi do estas kulpa? Sed kion vi do faris? Ha, mi komprenas! La lakto estis tiel acida. Vi — — Diru, kion vi enmiksis?

Patrino (*levas al li la interfingrigitajn manojn*). Ho, ne koleru kontraŭ mi, tion mi ne povus elporti!

Alberto (*kolerante*). Kion vi enmiksis?

Patrino (*kiel antaŭe*). Kelkajn gutojn el tiu boteleto — —

Alberto (*kuras al la ŝranko, elprenas la boteleton*). Ha, mi vidas! Dormigilon vi enmiksis, kiun vi uzis por Johano, kiam li havis la cerboekskuon! Sed, patrino, tio estas terura, tio estas abomena, tio estas nepardonebla! (*Li ĵetas la boteleton teren, kie ĝi dispecetiĝas; pli kolere:*) Patrino, vi ne komprenas, kion vi faris!

Patrino (*kurbiĝas pro teruro*). Mi volis savi vin —

Alberto. Savi min? Kaj vi mortigis mian amikon! Ĉu vi scias, patrino, kion tio signifas? Tio estas — perfida mortigo!

Patrino (*kiel antaŭe*). Perfida —?

Alberto. Jes, perfida mortigo. Huberto fidis min. Mi ĵuris reveni, kaj jen! Ho, sankta Dio, kion mi faros? Kion diros miaj kamaradoj? Ili scias, ke mi forkuris pro vi kaj pro Johano, kaj ion tian ili opinias natura, pardonebla. Sed nun ili akuzos min duoble kaj kun rajto. Mi ne nur fariĝis malinda mortiginto, sed samtempe malnobla ĵurrompinto kaj abomeninda malkuraĝulo. Sed mi pruvos, ke mi ne estas tia! Mi pruvos, ke mi ne forkuris timante la morton. Mi reiros al la kazerno kaj ekkrios laŭte, tiel laŭte, ke ĉiuj min aŭdos: Jen mi estas! Mortpafu min, kaj ĉio estas finita! — Tiam ili komprenos, ke mi ne estas perfidulo aŭ ĵurrompinto aŭ malkuraĝulo, kaj tiam ili ĉiuj pardonos al mi la mortigon kontraŭ Huberto.

Patrino (*falas sur la genuojn antaŭ li*). Ho pardonu, pardonu min! Pripensu, ke mi ĝin faris pro via frato! Ne reiru al la urbo — al la kazerno: estas ja tro malfrue! Kio fariĝis, ne refariĝos. Prefere forkuru!

Alberto. Jes, mi forkuros — al la kazerno — kaj eĉ tuj! (*Li iras al la fajroloko kaj subite ekhaltas.*) Miaj vestoj!?

Patrino (*kun ekkrio de teruro.*) Ha!!

Alberto. Miaj vestoj! Kie vi kaŝis miajn vestojn? Redonu ilin tuj! Eble mi povos ankoraŭ savi mian amikon. Eble oni prokrastis lian ekzekuton. Miaj vestoj!!

Patrino (*rigardas kun kreskanta teruro al la seĝo, sur kiu antaŭe pendis la soldataj vestoj*). Granda Dio, kie ili estas? Kaj kie estas

Johano? (*Kuras al la benko.*) For!! (*Ŝi kuras el la ĉambro tra la maldekstra pordo kaj revenas tuj.*) Kie li estas? (*Ekvidas liajn vestojn, kuŝantajn antaŭ la fajroloko.*) Dio potenca, kompatu min! (*Ŝi svenas kaj falas sur la vestojn.*)

Alberto (*portas ŝin sur la benkon kaj genufleksas antaŭ ĝi; atendas momenton*).

Patrino (*rekonsciiĝas*). Kompatema ĉielo! Ho, Alberto — ili mortpafis lin!

Alberto. Kiun?

Patrino. Vian kompatindan fraton. Ho Dio, Dio!

Alberto. Vi deliras, patrino. Rekonsciiĝu kaj pripensu!

Patrino (*ekploras*). Ho, mi ne deliras. Oni mortpafis lin, mian malfeliĉan knabon —

Alberto. Sed, patrino, vi ne scias, kion vi diras. Pripensu do!

Patrino. Ne estas bezone, ke mi pripensu.

Alberto. Sed mi tute ne komprenas ĉion tion. Parolu do!

Patrino. Li surmetis vian uniformon. Li iris al la kazerno, kaj tie oni mortpafis lin. Kaj mi estas kulpa!

Alberto. Sed klarigu do! Kial li farus tion? Mi komprenas nenion el ĉio tio.

Patrino (*konsternite pro malespero iras al sia seĝo, ekvidas la malfermitan biblion*). Jen! Tie estas la biblio! Li malfermis ĝin je la sama loko —

Alberto. Je kiu loko?

Patrino. Je la loko, kiun mi devis legi al li.

Alberto (*sidiĝas sur la alia seĝo ĉe la tablo, rigardas al la biblio kaj poste al sia patrino*).

Patrino. Li imagis, ke li eniros la ĉielon, kiam li estos mortinta. La tutan vesperon li parolis pri tio.

Alberto. *Lin* oni tamen ne ekzekutos. Oni ja rimarkos, ke li ne estas la vera ekzekutoto.

Patrino. Ho ve! Tion ili ne rimarkos. Vi estas tiel similaj unu al alia.

Alberto. Sed liaj blankaj haroj — — Huberto tuj rimarkos —

Patrino. La ĉapo kaŝas liajn harojn.

Alberto. Kio ajn estu kaj okazu, mi ne povas resti tie ĉi pli longe. Eble mi povos savi lin. (*Milde.*) Pardonu al mi, patrino, ke mi tiel eksplodis kontraŭ vi.

(*Ambaŭ ekstaras kaj ĉirkaŭbrakas unu la alian; poste la Patrino kaŝas la vizaĝon sur lia brusto, kaj Alberto karesas ŝian kapon.*)

Paŭzeto.

Lasta Sceno.

La Patrino. Alberto. Johano.

La pordo dekstre malrapide malfermiĝas, kaj sur la sojlo aperas Johano. Li turnas sin, mansalutas iun ekster la ĉambro, kiun oni tamen ne vidas; poste li eniras, fermas la pordon senbrue kaj rigardas momenton al la Patrino kaj al Alberto.

Alberto. Adiaŭ, patrino; Dio estu kun vi! (*Li ĉirkaŭbrakas ŝin refoje; poste li estas rapide forironta sed, ekvidante Johanon, li subite haltas kaj ekkrias*) Johano!

Patrino. Mia knabo! (*Iras al li kaj ĉirkaŭbrakas lin.*) De kie vi venas?

Alberto (*rapide rigle fermas la pordon*).

Johano (*kviete*). El la urbo.

Alberto. El la urbo?

Johano (*kviete*). El la kazerno — kun la serĝento Huberto. Li kondukis min ĝis tiu arbo. (*Li fingre montras la direkton*)

Alberto (*ĝoje*). La serĝento vivas!?

Johano. Li reiras al la kazerno. Li vivas, kaj *mi* vivas. *Mi* devas atendi ankoraŭ.

Patrino. Atendi?

Johano. Mi ne vidis Lin ankoraŭ. Ili ne — mortpafis min. Nun mi devos denove plektadi.

Patrino. Sed kio okazis kun vi?

Johano (*malĝoje*). Okazis — — ke ili ne mortpafis min.

Alberto. Kaj Huberto, la serĝento, vere vivas!?

Johano. La barbulo reiris al la kazerno. Li ploris.

Alberto. Ĉu vi komprenas lin, patrino?

Patrino. Estas pli bone, ke nur mi parolu kun li. Li ne povas respondi, se ni ambaŭ parolas al li. (*Al Johano.*) Je kiu horo vi eliris el la domo?

Johano. Je kiu horo? *(Pripensas.)* Mi ne memoras. Jes, mi memoras: kiam vi dormis ĉe la tablo.

Patrino. Kial en tiuj vestoj?

Johano. Ili jam estis sekaj.

Patrino. Jes; sed viaj estis ankaŭ sekaj.

Johano *(pripensas momenton)*. Mi ne povas diri.

Patrino. Ĉu vi ne kuraĝas diri tion, mia knabo?

Johano. Estas tro multe da vortoj.

Patrino. Vi volis kredigi al la serĝento, ke vi estas via frato, ĉu ne?

Johano. Jes.

Patrino. Kaj ĉu ili scias nun en la kazerno, ke vi *ne* estas via frato?

Johano. Ili pensas ĉiuj, ke mi estas mia frato.

Patrino. Kaj ili ne volis mortpafi vin?

Johano. Jes, ili volis, sed ne povis. Ho, mi memoras, ili pafis ĉiuj trans mian kapon. Kaj nun — mi devas atendi ankoraŭ.

Patrino. Kion atendi?

Johano *(post momento)*. Por vidi Dion.

Alberto. Ĉu vi komprenas lin, patrino?

Patrino. *(al Johano)*. Vi iris ĝis la kazerno, ĉu ne?

Johano. Jes, mi iris.

Patrino. Kaj kiu staris ĉe la kazerna pordego por atendi vin?

Johano. Tiu barbulo — la serĝento.

Patrino. Kion li diris al vi?

Johano. Li diris nenion.

Patrino. Sed kion li faris?

Johano. Li prenis mian brakon kaj iris kun mi en ĉambreton.

Alberto. Kiel aspektas tiu ĉambreto?

Johano. Ho, mi scias —, mi rigardis ĉirkaŭe —, nur muroj — unu longa benko kaj unu longa tablo — kun kruĉo — —

Alberto. Tio estis la arestejo.

Patrino. Kion vi faris tie?

Johano. Mi sidiĝis kaj rigardis ĉirkaŭe.

Patrino. Kaj kion tiu serĝento faris?

Johano. Nenion. Li ploris.

Patrino. Ĉu vi restis longe en tiu ĉambreto?

Johano *(pripensinte)*. Jes, longe; sed mi sidis tie — —

Patrino. Kio okazis post tio?

Johano *(pripensas momenton)*. Tri soldatoj venis. Ili havis pafilojn kun si kaj kondukis min sur larĝan korton.

Patrino. Kion ili diris al vi?

Johano. Nenion ili diris.

Patrino. Sed kion ili faris?

Johano. Tion mi memoras. Ili starigis min antaŭ alta muro, kaj subite staris antaŭ mi — — sep — ok — naŭ — dek aliaj soldatoj kun pafiloj sur la ŝultro.

Patrino. Kaj poste?

Johano. Ho, poste okazis io *tre* terura — *(subite)* — same terura kiel tiam, kiam mi svingiĝis super la ŝtonoj — ĉe tiu fumturo. — Ili staris antaŭ mi, unu flanke de la alia. Kaj unu je la dekstra flanko, kiu havis nudan sabron en la mano, kriis ion, kaj subite ĉiuj pafiloj leviĝis kaj celis al mi. — — Mi pensis: Jen mi vidos Lin! Kaj mi rigardis al la truoj de la pafiltuboj — — ok — naŭ dek — truoj. Kaj la soldatoj premfermis unu okulon, kaj per la aliaj, larĝe malfermitaj okuloj ili min fikse rigardis. Ho, tio estis terura — tiuj okuloj! Mi pensis: Jen ili volas trabori min samtempe — tiuj okuloj! *(Li premfermas unu okulon kaj priskribas per la etendita brako antaŭ si longan linion.)* Ho, estis terure, tiuj tubotruoj kaj tiuj okuloj! Mi pensis, ke refoje mi pendas je la ŝnuro — kaj ke mi svingiĝas tute supre — kaj ke mi falos sur la ŝtonojn — — Mi tiel timegis, ke miaj kruroj ektremis.

Patrino. Kaj poste?

Johano. Poste fariĝis nigra nokto — kaj mi falis. Tondris kaj fulmis — kaj post mi sur la muro io kraketadis.

Patrino *(post momento)*. Ĉu okazis nenio plu?

Johano. Jes, io alia okazis, mi memoras. Mi kuŝis sur tablo en granda ĉambro. Homoj parolis, kaj mi sidiĝis. Ĉirkaŭe staris la soldatoj kun la pafiloj. Ili ĉiuj rigardis nur min. La barbulo havis mian ĉapon en la mano kaj diris, ke mi havas blankajn harojn. Kaj ĉiuj rigardis miajn harojn. Poste venis la generalo. Ho, mi memoras.

Li demandis pri *ĉio* kaj pri miaj haroj, kaj mi diris: Ili blankiĝis — pro teruro!

Patrino. Kaj kion faris plue la serĝento?

Johano *(post momento)*. La serĝento? Li surmetis al mi la ĉapon, premis mian manon — kaj — li ploris.

Patrino. Kaj poste? Pripensu foje!

Johano. Poste? *(Pripensas momenton.)* Poste mi sidis en alia ĉambro — granda belega ĉambro kun bildoj kaj pentraĵoj sur la muroj. Mi sidis sur seĝo. Antaŭ mi sidis oficiroj kaj tiu generalo. Kaj denove ili demandis min pri ĉio — mi supozas — sed estas tro multe da vortoj — —

Patrino. Pripensu bone! Ĉu vi memoras nenion plu?

Johano *(pripensinte, levante la fingron)*. Unu el ili certigis, ke vere mi estas idioto. Kaj mi respondis: Tion diras ankaŭ la maljuna Heleno; sed estas skribite en la biblio, ke mi estas malriĉa en spirito — —

Patrino. Ĉu vi diris tion?!

Johano. Poste la serĝento malbutonumis mian surtuton kaj elprenis la pasporton el mia poŝo — kaj la generalo enskribis — —

Alberto. Donu al mi la pasporton, tuj! *(Li malbutonumas la surtuton kaj prenas la libron, malfermas ĝin, legas — kaj ĝojkrias:)* Ho, patrino! Rigardu! Jen estas skribite — —

Patrino. Kio?

Alberto. La milita konsilantaro pardonis kaj eksigis min el la milita servo pro — (*montras la pasporton*) — legu mem!

Patrino. Pro frenez— — Jes! — Ho, Dio ĉiopova, mi dankas Vin! *(Ŝi falas surgenue kaj kaptas la manon de Johano.)* Ho, fine veriĝis tio, kio estas skribita: „Feliĉaj estas la plorantoj, ĉar ili estos konsolataj.“ *(Ŝi kisas la manon de Johano.)* Pere de vi, mia knabo, via frato estas redonita al sia patrino!

Alberto *(genufleksante ĉe la alia flanko de Johano kaj kaptante lian alian manon).* Kara frato, kvankam vi agis tute senkonscie, vi savis min de tetura morto — dank' al Dio!

Johano. *(ridetas milde, rigardante antaŭ sin).* Kaj nun ni estas denove kune — kaj feliĉaj! Mi devas atendi ankoraŭ —, sed: mia estas la regno de la ĉielo, kaj poste, kiam mi estos mortinta, mi vidos Lin!

Patrino. Jes, kara knabo, vi vidos Lin!

La kurteno falas.

KSIĄŻNICA PODLASKA im. Łukasza Górnickiego Nr ..... FILIA Nr 14 w Białymstoku

Preso:
T. & H. Jung, Internacia Presejo-Eldonejo,
Horrem b. Köln, Germ.

Książnica Podlaska
im. Ł. Górnickiego w Białymstoku
KP-F14-0002638